

& Revina:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×12)+

(& Strofoj:

'1 Revina2 volus mare veli, ; la tutan mondon tiel celi,

(×:; **En la ĉen', dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 sed ĉar ŝi ne la monon havas, ; ŝi hejme restas, reve ravas.

'3 Se iam helpus al ŝi banko, ; ŝi tuj forvelus kaj kun danko.

'4 Ŝi lasus la amikon hejme, ; lin adiaŭus senprobleme.

'5 Ŝi globotrotus sen programoj, ; kaj montrus sin en panoramoj.

'6 Ŝin viroj sekvus kiel muŝoj, ; sed ŝi elektus por ekkuŝoj.

'7 Lastfine kantus ŝi en bando, ; revenus eĉ al la hejmlando,

'8 kaj tie ŝi koncertojn donus – ; se la amik' ŝin ne malspronus.

'9 Revina revas malgraŭ ĉio ; pri juna dio for en Rio,

'10 sed hejme ne tro aĉe estas, ; kaj tial ŝi sengrumble restas.

'11 Nu, hejme la amiko sidas, ; kaj tiu ja Revinan bridas.

'12 "Revina, mankus al vi sperto", ; li diras laŭte kaj kun certo.)